

JURA
TRIBUNO
INTERNACIA



N-ro 15
Jaro 2016
Esperanta Jura Asocio

Eldonas: ESPERANTA JURA ASOCIO
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta Adreso: José María Rodríguez Hernández
JURA TRIBUNO INTERNACIA
Apartado de Correos 3142
E-14080 CÓRDOBA (Hispanio)

Elektronika Adreso: esperanto14@ono.com

Direktoro: José María Rodríguez Hernández

Kunlaboris ĉi-numere: D-ino Rafaela Urueña Álvarez
Brian R. Moon
André Ruyschaert


La revuon ricevas ĉiuj membroj de EJA. Por aliĝi al nia asocio informoj aperas sur la paĝo 8-a

Depósito Legal: CO-844/97
Edita: Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado de Correos 611
14080 Córdoba
Imprime: Litopress SL

ENHAVO

	Paĝo
Prezento	5
Raporto pri la kunsido de EJA dum la Universala Kongreso. Lillo 2015 .	11
Vivo de la Asocio	16
De la Jarmilaj Evoluigaj Celoj al Daŭripova Evoluigo	25
Impost-paradizoj. <i>La Panamaj Paperoj</i>	43
Mallonga jura informo	48
Konsilia Reglamente n-ro 1	50

PREZENTO



Unu el la plej gravaj ĉi-jaraj okazintaĵoj estis la jam fame konata *Brexit*, ni uzu esperantigitan version “Briteliro”. Ankoraŭ en la monato julio, oni ne scias detale kiel finiĝos ĉi tiu projekto, eĉ ne la britaj aŭtoritatoj konas la sekvotan vojon, aŭ se konata ja ne sciigata. Tiel, la brita registaro ĵus informis, ke ili ne uzos la artikolon 50-an de la Traktato, tiu kiu antaŭvidas la eliron de ŝtato el la Eŭropa Unuiĝo.

Grava kaj interesa flanko de tiu ebla *briteliro* estas la lingva aspekto de la brita foriro. Ĉu la angla lingvo daŭre restos kiel la plej uzata idiomo en la Eŭropa Unuiĝo? Se fine Britio forlasas la Unuiĝon, la angla lingvo nur estos kun-oficiala lingvo en Irlando kaj en Malto, ŝtatoj kiuj luktis por la oficialigo de siaj lingvoj en Eŭropo, sed ne favore al la angla lingvo. Alie, ĉu la graveco de la angla lingvo ŝuldiĝus ne al la ekonomia forto de Britio, sed male al tiu de Usono? Ni ne konas la respondojn, ni scias nur, ke novan mon-unuon oni adoptis en Eŭropo antaŭ 15 jaroj *sur neŭtrala lingva fundamento* kaj nun, kiam la foriro de Britio eble malfermos debaton pri lingvoj en Eŭropo, ni, la esperantistaro, devos strebi por atingi la kun-oficialigon de nia lingvo en la Eŭropa Unuiĝo. Ĉu temas nur pri utopio? Respondu vi mem, sed ankaŭ estis utopio la unuiĝo de luktanta kontinento: Eŭropo nur antaŭ 70 jaroj kaj nun estas plenĝojiga realo, eĉ se kelkaj eŭropanoj deziras forlasi la projekton. Cele al ĉi ĉio nia jura esperantista asocio devos labori.

Esperanta Jura Asocio travivas interesan momenton. La sukceso de la asembleo en Lillo, kie partoprenis 25 homoj, realiĝis ankaŭ per la nomumo de nova estraro, kio garantias la estontecon de nia asocio. Nova estraro proponis novan statuton kaj eĉ novan nomon por nia asocio, jen taŭgaj temoj pridiskutindaj en Nitro. Pro tio, ni petas al ĉiuj interesitoj partopreni en nia jara asembleo kadre de la Universala Kongreso, ĉar nova statuto amase apogita, sendube alportos novajn fortojn al nia asocio.

Sed ne nur la nova estraro laboris dum ĉi tiu jaro. La realigado de virtuala kurso pri Juro de la Maro daŭriĝas. Ni eĉ kontaktis kun esperantlingva video-kompanio, kiu realiĝos la kurso, surbaze de la tekstoj proponataj de la respondeculoj de la eldonado de la virtuala kurso. Espereble, ĝi estos reala afero komence de la venonta jaro. Alia projekto kiu sukcesis estas ĉi tiu nova numero de nia revuo.

Jam estas kutimo, krom granda honoro, aperigi artikolon de D-ino Rafaela URUEÑA, nia plej prestiĝa profesorino pri internacia lingvo en la esperantista komunumo. Ŝi estas la nova honora prezidanto de la laborgrupo “Esperanto por UN”, kreita antaŭ jaroj de D-ro Humphrey TONKIN. Ŝi verkis artikolon pri la jarmilaj evoluigaj celoj aprobitaj de Unuiĝintaj Nacioj. La direktoro de la revuo verkis artikoleon pri la impost-paradizoj, tuj post la tutmonda diskonigo de la tiel nomataj: *Panamaj Paperoj*. Ĉi tiu afero ŝokis kelkajn ŝtatojn, kaj ja provokis eĉ demisioj, ekzemple tiu de la islanda ĉef-ministro. Alie, Brian MOON esperantigis la 1-an Reĝlamenton de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, kiu pritraktas la temon de la lingvoj uzendaj de la Eŭropa Unuiĝo.

Nu, jen la vico de la legantoj. Kiel kutime, ni profitas la okazon por inviti al ĉiuj interesitoj cele la verkadon de juraj eseoj, artikoloj, tradukoj aŭ ĝenerale tekstoj pritraktantaj jurajn temojn, estus granda honoro por nia revuo pligrandigi la nombro de konstatataj kunlaborantoj kaj tio sendube pliriĉigos la enhavon. Komprenble, ni ankaŭ deziras la plej grandan sukceson al la asembleo de Esperanta Jura Asocio, okazonta en Nitro (Slovakio), kadre de la Universala Kongreso kaj ni esperas, ke ĝi estos momento ne nur por labori sed ankaŭ por festi kaj praktiki nian internacian lingvon.

José María Rodríguez Hernández
Direktoro de
JURA TRIBUNO INTERNACIA



Omaĝe al
KEP ENDERBY
(1926 – 2015)
Eksa Prezidanto de
Esperanta Jura Asocio

ALIĜU AL ESPERANTA JURA ASOCIO

Ordinara membro devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri juro aŭ esti studanto por tia diplomo. Ĉiu alia persono povas peti aliĝon kiel asocia membro. Membriĝo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latina Ameriko. Kaj 14 eŭrojn se vi loĝas en alia lando.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r (pri pagmanieroj vidu en la *Jarlibro* de UEA). Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia elektronika adreso: esperanto14@ono.com



Kunlaboru kun *JURA TRIBUNO INTERNACIA*

Se Vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos Viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Vi nur devas atenti pri la jenaj kondiĉoj:

ARTIKOLOJ: rilataj al iu jura branĉo. Do: krimpuna, ekonomia, imposta, civila, internacia, historia, filozofia, administracia, ktp. Pri la

longeco, pli malpli 4/10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca). Se eble aldonu kelklinian resumon pri la artikolo.

RECENZOJ: Vi povas recenzi verkon. La libro elektota devas temi pri Juro, kvankam ne necese pri/en esperanto. La libro povas esti redaktata en kiu ajn lingvo, tamen la recenzon oni devas verki en esperanto.

INFORMOJ: Vi povas informi pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj, ktp, aŭ pri io rilata al la Juro en Via lando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi 1/3 foliojn.

TRAKTATOJ: se Vi tradukis kelkan internacian traktaton, aŭ scias kie aperas la Esperanto-traduko de kelka internacia kunveno, informu al ni pri tio.

Ne dubu kunlabori kun la jura revuo. La proksima numero aperos dum la monato junio 2015, do, prefere se oni ricevas la materialon antaŭ la fino de la monato majo 2015.

La redakciaj adresoj estas:

✉ *Jura Tribuno Internacia*. Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

💻 esperanto14@ono.com



Eksa sidejo de la Distriktestro en Nitro



Kastelo de Nitro

Raporto pri la kunsido de Esperanta Jura Asocio dum la Universala Kongreso Lillo 2015

Spite al la fakto ke la ĝenerala kunveno de nia jura asocio estas la plej grava okazintaĵo kie partoprenas la membraro, tamen dum la lastaj jaroj, dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto, la fakaj asocioj havas la ŝancon montri al la tuta esperantistaro kaj eĉ al eksteruloj, la vigecon kaj buntecon de la kulturo de nia movado.

Mi parolas pri la *Movada Foiro*, kiu ĉifoje okazis sabate, la 25-an de julio 2015, en la granda halo MICHAUX de la Granda Palaco de Lillo, kadre de la Universala Kongreso de Esperanto de la 19-a ĝis la 21-a horo.

Esperanta Jura Asocio havis propran tablon, kie estis videblaj la pasintjara eldonita libro “Eŭropa Unio, paŝon post paŝo” kaj aro da ekzempleroj de nia jara revuo “Jura Tribuno Internacia”. Vere tiu evento estas bonega ideo por trakuri la diversajn budojn, vidi la prezentatajn novaĵojn, babili kun aliaj esperantistoj, informiĝi pri la diversaj fakaj asocioj, laŭplaĉe, kaj rektontiĝi al geamikoj. Do, la Movada Foiro estis bone aranĝita, kun pli da tabloj ol neniam kaj ege interesa por informi pri nia asocio kaj agado.

La 28-an de julio 2015 okazis en la Salono CART de la Granda Palaco de Lille (Francio) la jara *kunsido de Esperanta Jura Asocio (EJA)*.



D-ino URUEÑA kaj S-ro IVO OSIBOV

La kunsido komenciĝis je la 16:20, kaj daŭris preskaŭ du horojn.

Unue, la Prezidanto de la Asocio D-rino M.Rafaela Urueña salutis la 25 gepartoprenantojn kaj sciigis la ĉeestantojn pri la ĝeneralaj aferoj de la asocio, nome ke EJA daŭre estas kunlaboranta faka asocio de UEA, ke ni aperas en la Jarlibro, kaj dankis la homojn kiuj pagis la jaran kotizon.

Sekve oni disdonis la lastan numeron de nia revuo “Jura Tribuno Internacia”, ĵus eldonita en Hispanio danke al nia redaktoro S-ro José María Rodríguez. La Prezidanto faris alvokon al kunlaboro en la revuo, per la sendo de artikoloj aŭ juraj informoj. Kelkaj ĉeestantoj petis danki al la redaktoro de la revuo pro lia konstanta laboro kaj akurateco.

Oni legis la jaran konteltiron kaj la Prezidanto informis pri la forpaso de nia eksa Prezidanto S-ro Kep Enderby, el Australio, la pasintan januaron, kiu estis gravulo en lia lando, klera juĝisto, parlamentano kaj Ministro pri Produktado kaj Justico, kaj samtempe li estis Prezidanto de UEA kaj rilate nian asocion Prezidanto de 1996 ĝis 2002, laboranta ĉiam entuziasme.

Oni informis la ĉeestantojn ke la Libro “Eŭropa Unio, paŝon post paŝo” bone disvendiĝis laŭlonge de la jaro kaj fakte ĝi jam elĉerpiĝis. Tio estas tre bona novaĵo.

Pri estonta agadplano, kaj kvankam en ĉi tiu kunsido oni devis elekti novajn estraranojn kiuj eble havos novajn ideojn por la estonto, la Prezidanto informis pri la projekto de Jose Maria Rodriguez kaj D-ino Urueña, pri Virtuala Kurso pri Juro de la Maro por la Universitato de Esperanto. La unua zorgos pri la temaro kaj teknikaĵoj kaj D-ino Urueña pri konsiloj kaj reviziado de la kurso.

Sekve, oni sciigis pri la neceso, laŭ nia Statuto ŝanĝi la estraron, komencis la Prezidanto kuraĝigi la homojn prezenti kandidatojn al la diversaj postenoj. Pro la fakto ke ne estis volontuloj kiuj respondis, la Prezidanto proponis S-ron Faria de Bastos, fama advokato en Portugalio kaj Angolo, bona esperantisto kaj longdaŭra membro de nia asocio, kiel novan prezidanton, kaj post pensi la aferon li akceptis kiel “lastan solvon”, laŭ liaj vortoj. Kiel Sekretario proponis sin la nuna prezidantino kun la celo helpi S-ron Faria de Bastos kaj samtempe esti ligilo inter la redaktoro de nia revuo en Hispanio kaj la asocio, kaj sekve oni elektis tri voĉdonantojn.

Do, la estraro de EJA restas jene:

PREZIDANTO-Advokato S-ro Miguel Faria de Bastos (Portugalia)

SEKRETARIO- D-rino Rafaela Urueña (Hispanio)

VOĈDONANTO-S-ro Hilary Chapman (Britio)

VOĈDONANTO- S-ino Antoaneta Nikolaeva (Bulgario)

VOĈDONANTO- S-ro Swietoslaw Fortuna (Pollando)

Oni forte aplaudis la novan estraron kaj dankis la antaŭan pro ilia laboro.



D-ino URUEÑA, S-ro FARIA DE BASTOS kaj S-ino ANTONEATA NIKOLAEVA

Kiel jam estis kutimo dum la lastaj jaroj, prelego sekvis. Ĉijare estis bona esperantisto kaj advokato *S-ino Antoaneta Nikolaeva kiu prelegis pri “La reformo en la bulgara kortuma sistemo”* post la aliĝo de Bulgario al Eŭropa Unio, kiam tiu organizaĵo konsideris ke en Bulgario estis nekontentiga situacio. Post kelkaj paŝoj, en 2014 fine, nova strategio de la registaro

ebligis ke la Komisiono de EU trovu ĝin taŭgan, ĉar la nuna strategio por juĝaj reformoj estas altnivela kaj prioritata.

S-ro Faria de Bastos, kiel ĵus elektita Prezidanto, gratulis la prelegantinon kaj ekigis viglan debaton kun la preleganto pri tiel interesa temo, ĉar ni ĉiuj konstatis ke tiuj problemoj tuŝas situaciojn similajn en aliaj landoj.

Fine post denove danki la antaŭan estraron kaj sen neniun proponanto por venontjara prelego, je la 18-a horo finiĝis la jara kunsido de EJA en Lillo

M. Rafaela Urueña

Vivo de la Asocio

§ Okaze de la kunsido de Esperanta Jura Asocio, okazinta kadre de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto, oni nomumis novan Estraron, al kiuj apartenas jenaj kolegoj:

PREZIDANTO-Advokato S-ro Miguel Faria de Bastos (Portugaliao)

SEKRETARIO- D-rino Rafaela Urueña (Hispanio)

VOĈDONANTO-S-ro Hilary Chapman (Britio)

VOĈDONANTO- S-ino Antoaneta Nikolaeva (Bulgario)

VOĈDONANTO- S-ro Swietoslaw Fortuna (Pollando)

§ S-ro António MARTINS-TUVÁLKIN de Portugaliao proponis novan simbolon por nia asocio, afero kiu ankaŭ estos pridiskutota okaze de la Asembleo en Nitro. Jen la laboro de nia portugala samideano:



Oficiala Logotipo



Standardo de la Jura Asocio

§ Jen la projekto pri nova statuto de la jura asocio, inkluzive ankaŭ de nova nomo por la asocio, pri kiu oni diskutos okaze de la asembleo de Esperanta Jura Asocio en Nitro, julio 2016.

INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO (IJEa) Statuto

Artikolo 1a (Nomo)

La nomo de la Asocio estas **INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO**, mallonge **IJEa**.

Artikolo 2a (Jura reĝimo)

1. La Asocio estas internacia persono, kun jura personeco kaj kun jura sidejo en Kardifo kaj ekzistanta laŭ la juro de Anglio-Kimrio.
2. Dum ĉiu estrarmandato, pro poŝtaj kaj praktikaj motivoj, la sidejo povas laŭfakte sanĝiĝi al la adreso de la estrara prezidanto, laŭ iniciato lia, kaj ankaŭ la estrara sekretario kaj la estrara kasisto rajtas havi siajn proprajn laŭstatusajn laborlokojn laŭ decido de la estraro.
3. La havaĵojn de la Asocio proprietas ordinare la Asocio mem aŭ, esceptokaze, unu aŭ pli el ĝiaj membroj.
4. La estraranoj responsas solidare pri la monaj ŝuldoj de la Asocio kaj rajtas el la havaĵoj sin kompensi prie.
5. La prezidanto povas enoficigi konfidariojn, minimume du, nomumitajn de la estraro por preni tiufreme la juran proprieton de havaĵoj de la Asocio.

Artikolo 3a
(Celaro)

1. Estas celoj de la Asocio:
 - a) Fortikigi la solidarecon inter siaj membroj;
 - b) Praktike kaj science uzi Esperanton sur ĉiuj branĉoj de la Juro;
 - c) Kiomeble perfektigi la juran terminologion en Esperanto;
 - d) Kiomeble videbligi Esperanton en juraj kaj nejuraj medioj pere de informado kaj interkomunikado;
 - e) Strebi al membrigo de interesatoj el kiomeble plej multaj landoj, cele al tutmonda reprezenteco de IJEA kiel jurista E-asocio;
 - f) Strebi al justeco, laŭleĝeco, homaj rajtoj kaj demokratio, ankaŭ ĉe oficialaj instancoj, naciaj aŭ internaciaj, en la mondo;
 - g) Defendi la rajtojn, interesojn, prerogativojn kaj imunecojn de ĉiuj juraj profesiuloj en la mondo, kun aparta atento al la asocioj de IJEA;
 - h) Kontribui al la aliro al kono kaj plenumado de la Juro kaj al la disvolviĝo de la jura kulturo en la mondo;
 - i) Intervenii, per iniciato propra aŭ aliula, kun respekto al la koncerna substanca jurisdikcio, ĉiam kiam, en konkreta kazo, konkreta homo aŭ persono ne ĝuas, tute aŭ parte, iun fundamentan rajton antaŭviditan en internacia aŭ plurnacia traktato pri homaj rajtoj aŭ kutime antaŭviditan en la Konstitucioj de demokrataj laŭjuraj Ŝtatoj;
 - j) Profundigi kaj disvastigi la konon kaj konscion pri la enhavo kaj signifo de lingva demokratio, ankaŭ rilate al indiĝenaj, malfavorataj kaj minoritataj lingvoj;
 - k) Korespondi kaj kunlabori kun eksteraj juristoj kaj kun juraj asocioj aŭ alispecaj similaj estaĵoj kadre de komunaj aŭ kunrilataj celoj aŭ funkcioj;

- l) Fortikigi la pliligitecon inter la Asocio kaj aliaj internaciaj kaj naciaj juraj asocioj aŭ similaj estaĵoj, koncernantaj al advokatoj, juĝistoj, prokuroroj, notarioj, estroj de ŝtataj registrejoj de nemoveblaĵoj, societoj kaj aŭtomobiloj kaj estroj de ŝtataj registrejoj de civitana statuso, jurinstruistoj, jurkonsilistoj kaj aliprofesiaj juristoj;
 - m) Kontribui, en aŭ ekster sia fako, al la edukado por tutmonda konscio.
2. Tiucele, la Asocio havu interalie periodan juran revuon kaj aktualigatan retpaĝaron
 3. Samcele, la Asocio klopodos publikigi esperantajn artikolojn kaj novaĵojn, ankaŭ pri la Asocio mem, en etnaj lingvoj, en neesperantaj revuoj kaj ĵurnaloj.

Artikolo 4a
(Neŭtraleco)

1. La Asocio estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko kaj sociaj problemoj.
2. Neŭtraleco nepre ne malhelpu la respekton al la homaj rajtoj, esence propraj en la agado de la Asocio.

Artikolo 5a
(Lingvo)

1. La sola oficiala lingvo de la Asocio estas la internacia lingvo Esperanto.
2. En internaciaj rilatoj, se necese, iu ajna lingvo povas esti uzata laŭ la cirkonstancoj.

Artikolo 6a
(Membreco)

1. Membro de la Asocio povas esti:
 - a) ordinara

- b) studento
 - c) staĝanto
 - d) korespondanto
 - e) merithava
 - f) honora
2. Ordinara membro devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.
 3. Membro-studento devas studi por licenciigo aŭ o pri Juro.
 4. Membro-staĝanto devas staĝi en jura profesio.
 5. Membro-korespondanto devas utile kunlaboradi kun la Asocio, ĉu esperante, ĉu alilingve, jen spontane, jen laŭ invito de la Asocio.
 6. Membro merithava devas, laŭ decido de asemblea kunsido, meriti tiun statuson pro laborado favore al la Asocio aŭ al ĝiaj celoj.
 7. Honora membro devas, laŭ decido de asemblea kunsido, meriti tiun statuson pro grava kontribuado al la sukceso aŭ videbligado de la Asocio aŭ al la plenumado de celo aŭ celoj de la Asocio.
 8. Iama prezidanto de la estraro de IJEA prezidanto de alia internacia jurista aŭ jura asocio, Esperanta aŭ ne-Esperanta, aŭ prestiĝega homo favorinta aŭ protektinta Esperanton, povas, eĉ post ia morto, akiri la statuson de Honora Prezidanto de IJEA, laŭ decido asemblea kunsido.
 9. Pri la akceptado de aliĝoj decidas la estraro, kiu ratjas prokurigi pri tio la sekretarion.
 10. Ĉiu ordinara membro estas devigata pagi jaran kotizon difinitan de la estraro.
 11. Membro kiu ne pagas sian kotizon dum pli ol unu jaro estu pridecidita kiel ekziginta.
 12. Ĉiu membro neordinara rajtas ĉeesti asemblean kunsidon, sen voĉdonrajto. La rajto ĉeesti estas transdonebla ankaŭ al nemembroj dum U.K., se prie konsentos la aj ordinaraj asocioj.

13. Ĉiu membro rajtas aliri al la retpaĝaro de la Asocio.

Artikolo 7a
(Estraro)

1. La estraro konsistas el prezidanto, sekretario, kasisto kaj du senoficaj membroj.
2. Ĉiu estrarano nepre estu ordinara membro.
3. La estraro direktas la agadon kaj la financojn de la Asocio sub gvidado de la prezidanto.
4. Por ĉiu estrara decido sufiĉas plimulto de la donitaj voĉoj.
5. Okaze de voĉdona egaleco, la prezidanto havas decidan voĉon.
6. La estraro laboras koresponde, ĉiam kiam eble tra la reto.
7. Decido de minimume tri estraranoj, eĉ ekster asemblea kunsido, estas valida, se ĉiuj estraranoj eksciis la koncernan proponon kaj havis okazon voĉdoni prie.
8. Dum la pago estos farata tra UEA-konto, la IEJA-kasisto devas, de tempo al tempo, peti konteltiron por ekscii la kvanton da enspezoj generitan de la kotizpago.

Artikolo 8a
(Elekto de estraranoj)

1. La ordinaraj membroj elektas la estraranojn ene de asemblea kunsido en ĉiu tria jaro per sekreta balotado rajtante tion fari poŝte per voĉdonilo enmetita en fermitan blankan senvortan koverton, kiu siavice estu enmetita en koverton adresitan al la prezidanto aŭ al la sekretario de la Asocio.
2. Kandidatoj povas anonci sin kiel liston kaj sendi sian programon retmesaĝe al la sekretario almenaŭ 30 tagojn antaŭ la elekta kunsido.

3. Se ĝis tiam estiĝos tia listo, la sekretario devos, ene de la sekvaj 15 tagoj, cirkulerigi tiun liston kaj programon retmesaĝe al ĉiuj ordinaraj membroj kun retadreso aktualigita.
4. Se ne estos akurata kandidatlisto ĝis tiu kunsido, tiam surloke oni starigos liston aŭ listojn de kandidatoj kun indiko de la koncernaj postenoj.

Artikolo 9a
(Oficperiodo)

1. La estraro oficas ĝis la fino de la tria jarkunveno post la elekto.
2. Neniu rajtas ofici kiel prezidanto dum pli ol du sinsekvaj oficperiodoj.

Artikolo 10a
(Malkonfido)

1. Se plimulto de la ordinaraj membroj esprimas pri la estraro malkonfidon per letero al la sekretario, oni devas elekti novan estraron.
2. Se la elekto estas konsiderata kiel urĝa de tiu plimulto, ĝi okazu retmesaĝe, antaŭ la dato de la asemblea kunsido.
3. La nova estraro tuj transprenas la direktadon de la Asocio kaj la malnova estraro estas konsiderata kiel demisiinta.

Artikolo 11a
(Kooptoj)

1. Se estrarano forpasas, ĉesas esti ordinara membro aŭ demisias, la estraro okazigu koopton.
2. La proceduro por koopto baziĝas sur la artikolo 10^a kun la necesaj modifoj.
3. Kooptita estrarano oficas dum la resto de la kuranta oficperiodo.

Artikolo 12a

(Estrara raporto)

1. La estraro raportas ĉiujare pri la agado kaj financoj de la Asocio.
2. La sekretario retmesaĝe dissendas la raporton ĝis la fino de junio.

Artikolo 13a

(Jarkunveno)

1. La jarkunveno okazas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.
2. Ĝi diskutas pri la agado kaj financoj de la Asocio kaj transdonas rekomendon al la estraro.

Artikolo 14a

(Eksigo. Amendo. Malfondo.)

1. Minimume dek ordinaraj membroj povas proponi per letero aŭ retmesaĝe al la sekretario eksigon de membro, amendon de la statuto aŭ malfondon de la Asocio.
2. Por aprobi la proponon en la jarkunsido necesas du trionoj de la donitaj voĉoj.
3. Se almenaŭ du trionoj de la donitaj voĉoj favoras la proponon, sed partoprenas malpli ol duono de la ordinaraj membroj, la estraro povas reokazigi la balotadon en la daŭro de unu monato.
4. Se la rezulto de la dua balotado estus simila, oni konsideru la proponon aprobita se temas pri amendo de la statuto aŭ malfondo de la Asocio, sed malaprobita, se temas pri eksigo de membro.
5. Balotado por eksigo de membro devas esti sekreta.
6. La eksigo estas malvalida, se oni ne antaŭe donis al la koncerna membro adekvatan okazon sin defendi.

Artikolo 15a
(Likvido)

En okazo de malfondo, la estraro nomas likvidanton, kiu kolektas la havaĵojn kaj, post pago de ĉiuj ŝuldoj, donacas ilin al Universala Esperanto-Asocio.



Franciskana Monaĥejo en Nitro

De la Jarmilaj Evoluigaj Celoj al Daŭripova Evoluigo

✍ D-ino María Rafaela Urueña Álvarez
Honora Prezidanto de Esperanto por UN
Hispanio

De la 25-a ĝis la 27-a de septembro 2015, pli ol 180 ŝtatrepresentantoj partoprenis en Novjorko Pintkunsidon pri Daŭripova Evoluigo por la venontaj dekkvin jaroj, do, kun celoj validaj ĝis 2030.

La oficiala vizito de Papo Francisko al la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), la 25-an de septembro, koincidis kun la inaŭguro de tiu Pintkunsido, kie la 27-an sammonate la ŝtatrepresentantoj de 193 landoj subskribis, unuanime, tiujn novajn Celojn por Daŭripova Evoluigo.

Sed kial tiuj celoj ĝuste nun?

La ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj de Uniĝintaj Nacioj kiujn oni lanĉis en la jaro 2000 validis ĝis la jaro 2015. Ili estis aprobitaj sub la konsidero ke tiuj celoj estis esencaj por la homaro, ĉefe por la malpli evoluintaj landoj, kiuj suferas malriĉecon kaj mankon de esencaj vivkondiĉoj kiel ekzemple, aliron al akvo. Pro tio, tiuj ok celoj fiksas la rigardon al *la elradikigo de la ekstrema malriĉeco kaj malsato, la atingo de universala elementa edukado, la antaŭenigo de seksa egaleco, la reduktado de la nombro de infanaj mortoj, la plibonigo de la patrina sano, la batalo kontraŭ la HIV/aidoso, malario kaj aliaj*

malsanoj, la certigo de median daŭripovo kaj la starigo de tutmonda partnereco por evoluigado.

Post 15 jaroj, oni agnoskis la bonan sukceson de kelkaj el tiuj celoj, precipe la unuajn, kaj aliaj celoj parte plenumiĝis. Pro la baldaŭa finiĝo de tiuj Jarmilaj Celoj, la ŝtatoj interkonsentis okazigi en 2012 Konferencon de UN pri Daŭripova Evoluigo (Rio+20) kaj starigi laborgrupon por formuli celaron por daŭripova evoluigo. Tiu ĉi laborgrupo, kiu konsistis el 30 membroj, kaj malfermita, oni starigis en januaro 2013, kun reprezentantoj nomumitaj de la membroŝtatoj de la kvin regionaj grupoj de UN. La membroŝtatoj decidis ke la kunsidoj estos pordo-malfermaj.

La laborgrupo kunsidis dum ok sesioj, okaze de tiuj ili traktis ĉiujn temojn poste aperintaj sur la 17 Celoj, inter ili, forigi malriĉon, forigi malsaton, garanti aliron al akvo kaj sanitaraj sistemoj, sano, dungiteco, makroekonomiaj aferoj, konsumado kaj daŭripova produktado, kaj ankaŭ homaj rajtoj, egaleco inter la seksoj, bona instruado, protektado de la medio kaj konstruado de la paco. En septembro 2014 la laborgrupo prezentis siajn rekomendojn kun la proponoj pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE). La raporto klarigis, ke la CDE devus trakti la tri dimensiojn de daŭripova evoluado (ekonomian, socian kaj median) kaj ties ligojn, kaj inkluzivi la sekvojn de la antaŭaj pintkunsidoj ekonomiaj, sociaj kaj mediaj, inkluzive la finan dokumenton de Rio+20.

Post unu jaro de malfermita intertraktado, laborgrupo prezentis 17 rekomendojn por deksep ĉefceloj, kaj 193 membroŝtatoj de UN interkonsentis finan dokumenton nomatan “Por aliigi nian mondon: Agendo por daŭripova evoluigo 2030” kaj ili fiksis daton, nome, de la 25-a ĝis la 27-a de septembro 2015, por la okazigo en Novjorko de altnivela kunsido ĉe la

Ĝenerala Asembleo de UN. Krome, por pritaksi la realigon de tiuj celoj, oni starigis Internacian Fakgrupon kiu konsentis liveri raporton en marto 2016.

Kial 17 ĉefceloj?

La Programo konsistas el 17 ĉefceloj kaj 169 subceloj, anstataŭ la 8 ĉefceloj kaj 21 subceloj de la antaŭa Jarmilaj Evoluigaj Celoj (JEC), ĉar la nuntempe kreskantaj defioj postulas pli ampleksajn alirojn, malfermitajn al profundaj studoj kaj disvolviĝo. Dum la JEC estis prilaboritaj de spertularo, pordoferne, la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE) sukcesis post malferma intertraktado de ĉiuj membroŝtatoj de U.N kaj amasa partopreno de la civila socio kaj aliaj partneroj, reprezentantoj de diversaj aspektoj de la socio. Tiuj aktualaj celoj traktas ĉiujn interligajn elementojn de la daŭripova evoluigo: ekonomian kreskadon, socian inkludon, protektadon de la medio.

Alia grava diferenco estas ke la JEC turnis sin unuavice, al evoluantaj landoj, precipe al la plej malriĉaj, dum la CDE estos aplikataj al la tuta mondo, riĉaj same kiel malriĉaj landoj kaj ĉiuj kontribuos al ilia plenumo.

Daŭripova evoluigo

Antaŭ ol studi pli detale la 17 ĉefcelojn, ni notu ke la koncepto de daŭripova evoluigo enhavas tri aspektojn: ekologian, ekonomian kaj socian.

La difino de la koncepto “daŭripova evoluigo”, proponita en 1987 de la Monda Komisiono pri Medio kaj Evoluo de UN, en la Raporto Brundtland (S-ino Gro Harlem Brundtland, tiama

norvega ministrino pri medio, prezidanto de tiu komisiono kaj aŭtorino de la raporto “*Nia komuna estonteco*”, submetita al la Ĝenerala Asembleo de UN en 1986) tekstas jene: *Daŭripova evoluigo estas tiu kiu plenumas la nunajn bezonojn de la homaro, sen limigi la eblojn de la estontaj generacioj plenumi la siajn*”.

Du konceptojn enhavas tiu nocio: *tiun pri bezonoj*, precipe la fundamentaj bezonoj de la plej senprovizuloj al kiuj oni devas gardi la plej altan prioritaton, kaj *la ideon de limigoj* kiujn la stato de nia teknologio kaj socia organizado metas sur la kapablon de la natura medio respondi al nunaj kaj estontaj generacioj. Fronte al la urĝeco de la ekologia kaj sociala krizo kiuj manifestiĝas mondscale (klimatsanĝiĝo, elĉerpiĝo de krudaj materialoj, nutra malsekureco, senarbarigo, perdo de biodiverseco, kresko de tutmonda loĝantaro, naturaj kaj industriaj katastrofoj ktp), la daŭripova evoluigo estas respondeco de ĉiu aganto en internacia kadro.

Oni devas apogi novajn universalajn valorojn, kiel ekzemple, la respondecon pri la natura medio kaj la ekologian partoprenon, ĉar daŭripova evoluigo koncernas ĉiujn sektorojn, nome, agrikulturon, industrion, loĝadon, turismajn servojn ktp. La Papo Francisko, dum sia oficiala vizito al la novjorka sidejo de UN, la 25-an de septembro 2015, klare defendis la naturan medion, kiam li diris ke “iu ajn damaĝo al la medio estas damaĝo al la homaro”; Li aldonis: “Estas esenca afero konservi kaj plibonigi la naturan medion kaj venki, kiel eble plej rapide, la ekonomian kaj socian fremdiĝon kiuj signifas la kompletan neadon de la homa frateco kaj gravegan atencon kontraŭ la homaj rajtoj kaj kontraŭ la medio. Vere, la malriĉuloj estas tiuj kiuj plej suferas tiujn atencojn”.

Dum la 1990-a jardeko, oni rekonis politike la daŭripovecon, tamen en la praktiko oni malmulte zorgis pri ĝi. Regis la emo unuavice antaŭenpeli sociajn kaj ekonomiajn konsiderojn. Bedaŭrinde ĉio ĉi estas neakordigebla kun la nuntempa vivnivelo kaj vivmaniero de multaj landoj en la mondo.

Historio kaj evoluo de la koncepto de daŭripoveco

La koncepto de daŭripova evoluo malrapide sin montris. La ideo de evoluo, iom post iom progresis, ĝis ĝi atingis nuntempe ĉiun socian kaj kulturen kampon. Inter la ĉefaj datoj de tiu evoluo estas la jenaj:

1909.- Apero de la koncepto *geonomio* en Centroeŭropo. La germana biólogo Ernst Haeckel kreis, unufoje, en 1866 la vorton “ekologio” por konsideri nian planedon kaj la biosferon, kiel nian domon aŭ hejmon. Tamen oni bezonis trovi novan vorton por priskribi la mastrumadon de tiu domo. Unu el la disĉiploj de Haeckel, la rumana oceanografo Gregor Antipa, en 1909, ekuzis la vorton “geonomio” por priskribi racian mastrumon de la naturaj rimedoj ĉefe en la basenoj de la rivero Danubo kaj de la Nigra Maro. Post la unua mondmilito, la franca geografo Albert Demangeon enkondukis tiun koncepton en la Okcidenton danke al libroj eldonitaj en Rumanio.

La vorto geonomio estis malmulte uzata poste, almenaŭ ĝis la dua mondmilito, kiam pluraj profesoroj memorigis pri tiu koncepto sed ankoraŭ nun ĝi estas preskaŭ nekonata. Tamen ĝi estas utila vide al la novaj defioj kaj malekvilibroj de nia medio. La geonomio konsideras ke la problemoj de la ekonomio, de la klimato, kaj de la naturmedio estas ligitaj, kaj ke sekve, ankaŭ liaj solvoj devas esti kunigitaj. Laŭ tiu perspektivo, ekologio kaj

ekonomio ne povas sekvi kontraŭajn vojojn: kaj la geonomio serĉas respondojn al tuthomaraj problemoj. Tio inkluzivas la konon de nia pasinteco por pli bone kompreni nian nuntempon kaj antaŭvidi nian estontecon.

1949.- La usona Prezidanto Harry Truman, post la dua mondmilito, kiam oni konsciiĝis pri la limigo de la naturrimedoj, en sia parolado pri la Stato de la Unio popularigis la vorton “evoluo” aŭ “disvolviĝo” kaj li instigis al politiko de helpo por la evolulandoj, per pli bona uzo de la mondaj homaj kaj naturaj rimedoj.

1965.- UNESKO organizis konferencon pri la biosfero. Michel Batisse kreis rezervejojn kie la vera daŭripova evoluo estis praktikata kaj proponis la *internacian programon “Man and Biosphere” (MaB)*, kun avangarda koncepto pri daŭripova evoluo. Tiu programo ekfunkciis en 1971 en la kadro de UNESKO. Ĝi proponis al la homaro ke ĝi zorgu pri la naturo, inter alie, per esplorado kaj agado sur la diversaj ekologiaj, sociaj kaj ekonomiaj kampoj. MaB partoprenas la internacian laboron por evoluigo, ĉefe laŭ la Celoj por Daŭripova Evoluigo kaj ĝenerale laŭ la laboroj por evoluigo post 2015. La interregistara strukturo de UNESKO konsistigas kadron por helpi la registarojn de la ŝtatoj planadi kaj plenumadi diversajn programojn de esplorado kaj agado kun helpo de scienca konsilado. La Programo MaB laboras, laŭ agadplanoj sur tri kampoj: perdo de biodiverseco, klimatsanĝiĝo kaj daŭripova evoluigo.

1968.- *Kreo de la Klubo de Romo*, kiu arigis eminentulojn el pluraj landoj kun la deziro stimuli esploron de la problemo de tutmonda evoluigo, laŭ ĉiuj perspektivoj, por ebligi la identigon de la ekonomia kresko post periodo de danĝera senzorga kreskado.

1971.- En Francio oni kreis Ministerion pri natura kaj media protektado.

1972.- Fakte tiu ĉi jaro estis unu el la plej signifaj por la natura medio. La Klubo de Romo publikigis gravan raporton (*Raporto de Meadows*) pri la evoluo de la homa loĝantaro laŭ la ekspluatado de la naturrimedoj, kun projekcio ĝis 2100. La raporto konkludis ke se la nuna kreskado de la monda loĝantaro, la industriigo, la poluado, la nutraĵproduktado, kaj la ekspluatado de la naturaj rimedoj daros sen vario, ili atingos siajn absolutajn kreskolimojn ene de la venontaj cent jaroj, kaj sekve tiu kreskado ne estas eltenebla.

Sed por ni la plej grava evento de la jaro 1972 estis la *Pintkunsido de UN pri la Homa Medio*, okazinta en Stokholmo de la 5-a ĝis la 16-a de junio, kie oni montris la interagojn inter ekologio kaj ekonomio, kaj oni komparis la evoluon de la sudaj malriĉaj landoj kun tiu de la nordaj jam evoluintaj landoj. Oni donis al ĝi la nomon “monda pintkunsido” ĉar en ĝi partoprenis preskaŭ ĉiu membroŝtato de UN. Kvankam oni povas konsideri la aranĝon relative malsukcesa pro manko de deviga kompromiso, tiu pintkunsido malfermis la pordon al konsciigo de la mondo pri naturmediaj problemoj, ĝis tiam flankenlasitaj. La konferencon malfermis la sveda ĉefministro Olof Palme, kiu aparte emfazis la neceson pridiskuti la situacion de la natura medio. En ĝi partoprenis 113 ŝtatoj, 19 registaraj organizoj kaj pli ol 400 neregistaraj organizoj.

La monda kunsido finiĝis per adopto de grava Deklaracio kun 26 principoj, kiu enhavis klaran agnoskon de la natura medio

kiel *monda heredaĵo de la homaro, nepre transdonebla al estontaj generacioj.*

1980.- La *Internacia Unuiĝo por Konservado de la Naturo* publikigis raporton titolitan “*la monda strategio por konservado*”, kie aperis unuafoje la esprimon “daŭripova evoluigo”, t.e. en la angla “sustainable development”.

1985.- Subskribo de la *Konvencio pri la protektado de la ozontavolo*, la 22-an de marto, en Vieno. Ĝi estis reago al eltrovo de truo en la ozontavolo.

1987.- *Raporto Brundtland*, kie oni difinis la koncepton de daŭripova evoluigo. En 1983-a, la Ĝenerala Asembleo de UN komisiis, kiel dirite, al s-ino Gro Harlem Brundtland, plurfoje ministro pri medio, starigi sendependan komisionon por ekzameni la situacion de la naturmedio en la mondo, kaj proponi longdaŭran strategion por la dumilaj jaroj. La raporto de la komisiono aperis en la jaro 1988 en franca lingvo sub la titolo “*Notre avenir a tous*”.(nia estonteco por ĉiuj).

Alia grava atingo de la jaro 1987 estis subskribo, la 16-an de septembro, de la *Protokolo de Montrealo*. Tie oni fine montris ke kolektiva engaĝiĝo eblas. Temas pri Protokolo aldonita al la Konvencio de Vieno por la protektado de la Ozontavolo, de 1985, por redukti la produktadon kaj konsumon de diversaj substancoj kiuj atencas kontraŭ la ozontavolo. La protokolo ekvalidis la 1-an de januaro 1989.

1990.- *Unua raporto de la interregistara grupo de ekspertoj pri climatevoluado* (GRIEC) kiu ekavertis al la internacia komunumo pri la riskoj de tutmonda varmiĝo pro koncentriĝo en la atmosfero de gasoj je forceja efiko.

1992.- *Dua Pintkunsido de la Tero (Konferenco pri Medio kaj Evoluo)*, okazinta en Rio de Janeiro (Brazilo), fakte 20 jarojn post la Stokholma Pintkunsido. Ĉi tie oni popularigis la esprimon “daŭripova evoluigo”, koncepto ekuzata de la amasmedioj. Sur tiu bazo kaj tiu de la komitatoj, la konferenco adoptis tri nedevigajn deklarojn, nome, “Agendo 21” (por la 21-a jarcento), Deklaracion anoncantan la ĝeneralajn principojn de mediokonservado kaj Deklaracion pri arbaroj. La Agendo 21 estas agadprogramo por apliki la principojn de la deklario pri medikonservado, sed rilata ĉefe al sociaj kaj ekonomiaj dimensioj, (batali kontraŭ la malriĉeco, ŝanĝi la konsumemon, demografia dinamiko, sano, lukto kontraŭ polucio, gardado de la biodiverseco, helpo al aŭtoktonaj popoloj ktp.)

Krome, tre grava estis la malfermo al subskribo de du devigaj traktatoj: tiu pri klimatsanĝiĝo, subskribita la 5-an de junio, en Rio de Janeiro, kaj tiu pri biodiverseco, adoptita en Najrobio la 22-an de majo kaj poste subskribita la 5-an de junio en Rio de Janeiro, dum la konferenco pri medio kaj evoluo. En ambaŭ traktatoj la defendo de la klimato kaj de la biodiverseco estas proklamitaj “komuna intereso de la homaro”.

La 15-an de decembro 1992, *Eŭropa Unio* aprobis la *Kvinan Agadprogramon pri Medio sub la titolo “Politiko pri Medioprotektado kaj Daŭripova evoluigo, kiu respektos la Medion”*. Tiu agadprogramo estis direktita al la pretendo ke ĉiu membroŝtato de Europa Unio plenumu la celojn de la UN Konferenco de Rio de Janeiro pri la Medio. Do, la termino “daŭripova evoluigo” kuŝas ene de tiu Programo kaj de la sekvontaj.

1997.- *Tria Konferenco de UN pri Klimatevoluigo*, okazis de la 1-a ĝis la 12-a de decembro, en Kioto (Japanio) kiel postsekvo al la UN konvencio pri Klimatsanĝiĝo. En ties kadro oni redaktis la samnoman Protokolon por Redukti la Elsendojn de Gasoj je Forceja Efiko. Ĝi fiksas por la subskribantaj landoj, akcepteblan nivelon de ellaso de karbona dioksido kaj kvin aliaj forcejaj gasoj. La 16-an de novembro 2006 la Protokolo ekvalidis, post kiam Rusio ratifis ĝin fine de la 2005-a jaro. El la 161 ratifintaj landoj en 2006, nur tridek ok devus malpliigi siajn forcejajn gasojn ĝis 2012 kompare al nivelo de 1990.

2001.- *Universala Deklaracio de UNESKO pri Kultura Diverseco*, adoptita okaze de la 31-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO la 2-an de novembro, en Parizo, asertis ke respekto al kultura diverseco, al toleremo, dialogo kaj kunlaboro troviĝas inter la plej taŭgaj rimedoj por la paco kaj internacia sekureco. Jam en la 1-a artikolo, la Deklaracio asertis ke “kultura diverseco estas heredaĵo de la homaro kaj ĝi devas esti agnoskata favore al la nunaj kaj la estontaj generacioj”. En posta artikolo oni deklaris unuafoje ke la kultura diverseco estas “pruvo de daŭripova homa evoluigo”. La Deklaracio enhavas du partojn. La unua traktas pri identeco kaj diverseco kaj agnoskas ke la kultura diverseco estas tiel necesa por la homaro kiel la biodiverseco por la vivantaj estaĵoj. La dua parto okupiĝas pri la rilato inter kultura diverseco kaj homaj rajtoj, en la senco ke tiuj rajtoj garantias la kulturalan diversecon.

2002.- *Pintkonferenco de Johanesburgo pri daŭripova evoluigo*, kunvokita de UN, okazis de la 26-a de aŭgusto ĝis la 4-a de septembro. Pli ol cent ŝtatestroj, registaraj delegitoj kaj reprezentantoj de Ne Registaraj Organizoj (NRO) partoprenis la konferencon kaj subskribis Deklaracion pri Daŭripova Evoluigo pri la konservado de la naturrimedoj kaj biodiverseco. La

Deklaracio celis antaŭenigi la mondan ekonomian kaj socian evoluon sed samtempe, prizorgi la protektadon de la medio kiel komplementajn pilierojn de la daŭripova evoluigo. Tiu ĉi konferenco celis konsciigi la homaron pri la graveco de la daŭripova evoluigo por ke ĉiu homo povu plenumi siajn nunajn kaj estontajn bezonojn, sen damaĝi la medion.

2003.- *Konvencio pri konservado de la nemateria kultura heredaĵo*, estis aprobita en la 32-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, en Parizo la 17-an de oktobro, kaj ekvalidis en aprilo 2006 pro ratifo de 30 ŝtatoj. Multaj tiaj nemateriaj kulturaj manifestiĝoj estas vivantaj kaj transdonataj de generacio al generacio, kaj sekve formas elementojn en daŭripova evoluigo. Laŭ la art.2 de tiu konvencio, la nemateria kultura heredaĵo, devas esti akordigebla al la internaciaj konvencioj pri homaj rajtoj kaj al respekto inter komunumoj, grupoj, individuoj. Ili estu ankaŭ akordigeblaj kun la principo de daŭripova evoluigo.

2005.- *Konvencio pri protektado kaj antaŭenigo de la diverseco de kulturaj esprimiĝoj*. La Konvencio estas traktato de UNESKO, deviga, adoptita de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO la 20-an de oktobro, kaj subskribita la 10-an de decembro. Ĝi devus ekvalidi tri monatojn post la ratifo fare de 30 ŝtatoj. La ĉefa celo de la Konvencio estas garantii al artistoj, kulturagantoj kaj tutmondaj civitanoj, la eblecon krei, produkti, diskonigi kaj ĝui kulturajn valorojn, kaj montri ke ili havas ne nur gravan ekonomian valoron sed ankaŭ kulturspecifan valoron. La Konvencio agnoskas ke “la diverseco de kulturaj produktoj estas grava same por individuoj kiel socioj”, kaj “la antaŭenigo de kultura diverseco estas esenca kondiĉo por la daŭripova evoluigo por la nunaj kaj estontaj generacioj”. La Konvencio ricevinde la

postulatan nombron de ratifoj, ekvalidis en 2007. Ĝi konsideras la kulturan diversecon “fundamenta motoro de la daŭripova evoluigo de homgrupoj, popoloj kaj nacioj”.

2015.- *Konvencio pri Klimatŝanĝiĝo 2015*. La 21-a Klimatkonferenco de UN, okazinta en Parizo de la 30-a de novembro ĝis la 12-a de decembro, kun partopreno de 195 ŝtatoj, celis novan klimatan interkonsenton kiu celas malpliigi la emisiojn de forcejefikaj gasoj. La tasko de la konferenco estis krei sekvon de la Protokolo de Kioto finiĝonta en 2020, (origine en 2012, sed ĝi longiĝis en la kunveno de Doha). La Konferenco finiĝis per aprobo de la t.n. *Konvencio de Parizo*, la 12-an de decembro 2015. Jam en la antaŭparolo oni elstarigas la firman kunligitecon inter ĉio rilata al klimatsŝanĝiĝo kaj la aliro al justa daŭripova evoluigo, ĉar la klimatsŝanĝiĝo kaj la daŭripova evoluigo estas necesoj ege gravaj por la tuta homaro. La Konvencio agnoskas ke la partoprenantaj landoj konsideras grave alfronti kaj malhelpi la klimatsŝanĝigon, kaj kontribui al daŭripova evoluigo. (Art.8).

Celoj por daŭripova evoluigo

La programo konsistas el 17 ĉefceloj, kiuj estas jenaj:

1.- Forigi malriĉon ĉie, en ĉiuj ĝiaj formoj.

Por tiu celo oni devas garantii la justan aliron al ekonomiaj kaj teknologiaj rimedoj kaj krei socian protektadon por la plej malriĉaj homoj.

2.- Forigi malsaton, atingi manĝosekurecon kaj pli bonan nutraron, kaj antaŭenigi daŭripovan agrikulturon.

Temas pri la ebleco havi bonan nutradon por ĉiuj, certigante la daŭripovecon kaj agrikulturan produktadon, interalie, per helpo al la malgrandaj agrikulturistoj, kaj iliaj infrastrukturoj.

3.- Garantii sanajn vivojn kaj kreskigi bonfarton por ĉiuj homoj en ĉiuj aĝoj.

Oni klopodos redukti la patrinan kaj infanajn mortoftecon per sistema prevento de malsanoj kaj per taŭgaj sanitaraj servoj. Por plenumi tiun celon gravas investi por la koncerna esplorado.

4.- Garantii inkluzivan kaj egalecan bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancojn por tutviva lernado.

Por garantii tion ĉi, ĉiuj infanoj devas fini la elementan kaj duan ciklon, kaj necesas plibonigi la superan kaj teknikan edukadon por atingi plej bonajn laborpostenojn. Ĉiuj strukturoj kaj lernejoj instalaj devas esti pretaj por akcepti homojn kiuj troviĝas en pli malfavoraj situacioj (virinoj, indiĝenoj, handikapuloj ...).

5.- Atingi egalecon inter la seksoj kaj plivastigi la decidopovon de ĉiuj virinoj kaj junulinoj.

Do, elimini ĉian diskriminacion, perforton, kaj ĉian ekspluatadon.

6.- Garantii al ĉiuj homoj haveblon kaj daŭripovan mastrumadon de akvo kaj sanitaraj sistemoj.

Temas pri urĝa bezono je universala aliro al trinkebla akvo, reduktado de poluado kaj certigo de bonaj sanitaraj servoj.

7.- Garantii al ĉiuj homoj alireblon al pagebla, fidinda, daŭripova kaj moderna energio.

Necesas faciligi la modernajn renovigeblajn energiojn ene de aro da energifontoj, kaj krei aliron al esplorado kaj al nepoluaj teknologioj en ĉiu lando, precipe en la malpli evoluintaj.

8.- Antaŭenigi daŭran, inkluzivan kaj daŭripovan ekonomian kreskon, plenan kaj produktivan dungitecon, kaj bonkondiĉan laboron por ĉiuj homoj.

Oni devas antaŭenigi novajn politikojn pri daŭripova evoluigo, celantajn sekuran dungitecon kaj garantii laborrajton por ĉiuj.

9.- Konstrui elteneman infrastrukturon, akceli inkluzivan kaj daŭripovan industriigon kaj kultivi inventemon.

Oni klopodos pliigi la sciencan esploron kaj plibonigi la teknologian kapablon de la industriaj sektoroj de ĉiu lando, ĉefe la malpli evoluintaj, per instigo de inventemo kaj daŭripoveco.

10.- Redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj.

Por tiu celo oni devos stimuli la socian, ekonomian kaj politikan inkludon de la tuta loĝantaro ene de landoj, per fiskaj, salajraj kaj sociaj leĝoj cele al progresiva atingo de plej granda egaleco.

11.- Igi urbojn kaj homajn loĝejarojn inkluzivaj, sekuraj, eltenemaj kaj daŭripovaj.

Por tiu celo, oni devas certigi la aliron al loĝejoj kaj taŭgaj bazaj servoj, sekuraj kaj elteneblaj por ĉiuj, per inkluziva planado de urboj.

12.- Garantii daŭripovajn formojn de konsumado kaj produktado.

Necesas efike uzi la naturrimedojn ŝirmante la medion kontraŭ ĉia nocado. Ankaŭ necesas antaŭenigi la daŭripovan edukadon kaj turismon, kaj bone informi la tutmondajn konsumantojn.

13.- Urĝe agi por kontraŭbatali klimatsanĝiĝon kaj ties efikojn (konforme al la Kadra Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Klimatsanĝiĝo).

La klimatsanĝiĝo estas nuntempa grava realaĵo kiun ĉiu lando devas kontraŭbatali, laŭ la internaciaj traktatoj de Unuiĝintaj Nacioj.

14.- Konservi kaj daŭripove utiligi la oceanojn, marojn, kaj marajn resursojn cele al daŭripova evoluigo.

Por tiu celo, oni devas eviti kaj redukti la maran poluadon, per protektado de la maraj ekosistemoj, forigante la neleĝan kaj troan fiŝkaptadon por atingi daŭripovan evoluadon. Bezonataj estas pliaj esploroj por plibonigi la sciencan konon cele al konservado de la oceanoj kaj ilia biodiverseco.

15.- Protekti, restarigi kaj disvastigi daŭripovan uzadon de teraj ekosistemoj, daŭripove mastrumi arbarojn, kontraŭbatali dezertiĝon, haltigi kaj inversigi la degeneradon de grundoj kaj haltigi la perdiĝon de biodiverseco.

Urĝas apliki la leĝojn kaj internaciajn traktatojn por konservi la tutmondajn ekosistemojn, per malpliigo de la media degenerado, kaj por konservado de arbaroj kaj de biodiverseco.

16.- Antaŭenigi la konstruadon de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭripova evoluigo, garantii aliron al justico por ĉiuj homoj, kaj starigi efikajn, respondecajn kaj inkluzivajn instituciojn je ĉiuj niveloj.

Necesas elimini ĉiun perforton kaj ekspluatadon, per naciaj kaj internaciaj leĝoj, kaj per plifortigo de la naciaj institucioj tiucele, kaj per forigo de deliktado kaj terorismo.

17.- Plifortigi la realigajn kapablojn kaj revigligi la tutmondan partnerecon por daŭripova evoluigo.

Tiu ĉi fina celo kovras kvin punktojn: *Financoj*, (plifortigo de la internaj rimedoj kaj internacia helpo al evoluantaj landoj); *Teknologio*, (plifortigi la regionan kaj internacian kunlaboron Nordan-Sudan, kaj Sudan-Sudan, rilate al la teknologio kaj ĝia aliro); *Realigaj kapabloj*: (pliigi la internacian apogon al programoj por la instigado de realigaj kapabloj, precipe en la evoluantaj landoj); *Komerco*: (Antaŭenigi sistemon de universala multflanka komerco, malfermita, nediskriminacia kaj justa, ne forgesante la eksportadon al la evoluantaj landoj); Kaj fina punkto, kiun oni povus nomi *Aliaj gravaj temoj*, Ekzemple, kohero de normoj kaj institucioj,

formado de aliancoj, kolektado de datumoj ktp., cele al tutmonda alianco por daŭripova evoluigo, kiu apogu la kapablojn de la evoluantaj landoj.

Tiuj CDE ne estas devigaj, ĉar la teksto ne estas traktato, do, la plenumado de tiuj ĉi celoj estos libervola por ĉiuj landoj, kiuj elektos la plej taŭgajn rimedojn por plenumi ilin.

Lingvo kaj kulturo

Laste sed ne balaste, ni notu, post studo de la enhavo de la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo, ke oni neglektis la gravecon de lingva diskriminacio. Pluraj deklaroj de UNESKO klare agnoskas ke oni devas konservi lingvan diversecon kaj eviti lingvan diskriminacion, ĉar la lingvo estas instrumento de kultura heredaĵo. Foje, la naciaj registaroj emas konsideri la grandan lingvan diversecon de la mondo, kiel baron por komunikado kaj evoluigo. Tamen kiel agnoskis jam en 1996 la *Manifesto de Prago por la Internacia Lingvo Esperanto*, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Do, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivestaĵo, estas valora pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

La kultura diverseco estas “komuna heredaĵo de la homaro” kaj devas esti plifirmigita favore al la nunaj kaj estontaj generacioj. Ĝia defendo estas etika ordono nedisigebla de la respekto al digno de la homo, ĉar la kulturaj rajtoj estas kerna parto de la homaj rajtoj, kiuj estas universalaj kaj nedisigeblaj.

Laŭ la Manifesto de Prago, “*ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo*”, kaj “*ni asertas ke la politiko de*

komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo”.

Vere, la kultura diverseco estas nenies propraĵo, do, ĝi apartenas al la tuta homaro.

Atingi egalecon kaj pacon por la venontaj 15 jaroj estas eble, se ni kolektive mobilizas la politikan volon kaj la necesajn rimedojn, kaj se samtempe ni kune laboras por la atingo de media kaj monda daŭripovo.



Justica Palaco en Nitro, starigita en 1903

IMPOST-PARADIZOJ

La Panamaj Paperoj

✍ **José María Rodríguez Hernández**
Hispanio

La ĵusa tutmonda diskonigo de la tiel nomataj “*Panamaj Paperoj*” evidentigis la impostajn manovrojn de amaso da homoj, multaj el ili publikaj gravuloj. Post la apero de tiuj dokumentoj revigliĝis la debato pri la impost-paradizoj kaj la ekzisto-pravo de tiuj teritorioj.

Kio estas impost-paradizo?

La vorto naskiĝis ĉe la angla lingvo kiel *tax haven*, (impost-haveno), la franca lingvo adoptis ĝin sed oni mistrafis la anglalingvan vorton *haven* pere de tiu son-simila *heaven*, kies signifo estas “ĉielo aŭ paradizo”. Do, en la franca lingvo tiaj teritorioj nomiĝis “*paradis fiscale*”, difino kiu populariĝis, el tie en esperanto “impost-paradizo” aŭ “fiska paradizo”.

Tamen, se ni akceptas tiun unuan ideon, reale ne temas pri loko kie la impostoj trovas paradizon, sed rifuĝejon kaj ni memoru, ke rifuĝejo estas la loko kiu utilas por gardi aŭ protekti iun. Se anstataŭ homoj ni parolas pri havoj, tiuj kiuj meritas esti protektitaj aŭ garditaj, estas tiuj kiuj multege valoras, kiuj de ĉiam estas savitaj en sekurigitaj lokoj. Krome, se oni konsidras, ke tiuj havoj povus deveni el kontraŭ-leĝaj, aŭ almenaŭ ne-leĝaj, agadoj, la loko pli taŭga por utili kiel rifuĝejo estus tiu nenies

konata. Ni pripensu unuamomente, tiujn galionojn perforte frapitaj de piratoj kiuj atingis oron kaj juvelojn, evidente, la plej

taŭga loko por gardi ĉi ĉion estis malgranda kaj dezerta insulo troviĝanta meze de la oceano.

Ni translokigu tiun ideon en la nuntempon kaj ni komprenos unuavide pri kio temas impost-paradizo, tio estas: loko malproksima de la amasa normala komercado, kiu gardas, sen koni la ekzaktan lokon, fortunon kiu apartenas al ne-konatululo.

Kiaj estas la karakterizaĵoj de impost-paradizo?

Antaŭ unu jarcento la impostojn oni devis pagi sur la loko kie okazis la komercaj transakcioj, tamen nuntempe la impostojn oni pagas sur la loko kie loĝas la jura aŭ privata persono, sendepende de la ŝtato kie oni atingas tiujn enspezojn. Do, tio plej grava estas la loko kie sidas la homo kiu devas pagi impostojn. Ekzistas lokoj kie la pagenda imposta kvanto estas ege malgranda, eĉ preskaŭ nula, tiuj lokoj estas tre allogaj por tiuj homoj kiuj devas pagi grandan kvanton da mono. Tiel, la plej grava karakterizaĵo de tiuj impost-paradizoj estas malgranda nivelo de la impostaj devoj.

La Organizo por Ekonomia Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE), pere de la dokumento de la jaro 1998 Informo pri Damaĝa Fiska Kompetenco, diskonigas pliajn karakterizaĵojn de la impost-paradizoj, tiel la internacia ekonomia organizo ankaŭ parolas pri:

- Nula interŝanĝado de informoj kun aliaj ŝtatoj rilate ekonomiajn havaĵojn de homoj aŭ de entreprenoj.
- Nula reala ekonomia agado de la teritorio, pro la fakto ke la solaj ekonomiaj rimedoj estas la financaj servoj havigitaj al la kapitaloj troviĝantaj sur la teritorio.

- Nula informado pri la impost-pagantoj ĉe la teritorio.

Kial teritorio fariĝas impost-paradizo?

Nu, la respondon ni jam havigis antaŭe. Temas pri la sola ekonomia rimedo de la teritorio, pro la fakto, ke ĝenerale temas pri malgrandaj lokoj sen apenaŭ naturaj rimedoj, do la plej taŭga maniero atingi enspezojn estas altiri kapitalojn kaj oferi rifuĝon al ili.

Kio estas necesa por konstitui impost-paradizon?

Unualoke estas necese, kompreneble, ĝui teritorian suverenecon kaj esti kapabla aprobi kaj observigi leĝojn. Ĝi ankaŭ devas oferi al la havantoj de tiuj kapitaloj tute liberan kapablon por disponigi ilin, ofte, ankaŭ translokigas siajn kapitalojn en impost-paradizojn tiuj homoj loĝantaj en ŝtatoj kie ne estas eble disponi absolute libere pri tiu mono okaze de testamentaj negocoj.

Ĉu la impost-paradizoj malaperiĝos iam?

Ni estu realismaj, ili neniam malaperos tute komplete, pro la fakto, ke la ekzisto-pravo de tiuj teritorioj ne estas ĉiam la malgrandaj pagendaj impostoj, sed ankaŭ temas pri lokoj kie estas eble kaŝi la riĉecon atingitan dank'al kontraŭ-leĝaj agadoj, kiuj kompreneble estas necese kaŝi. Kiel en la ekzemplo antaŭe dirita, la piratoj de la 17-a jarcento bezonis lokon por gardi la trezoroj atingitaj post la rabado de riĉaj galionoj, nuntempe tiuj piratoj estas tiuj uloj kiuj ŝakras per drogoj, disvendas armilojn aŭ kiun alian ne-leĝan varon. Do, se ekzistas tiuj fiaj negocoj, ekzistos impost-paradizoj.

Kiuj lokigas sian monajn havaĵojn ĉe impost-paradizoj?

Kvankam ĵus antaŭe oni diris, ke fiaj uloj gardas sian monon atingitan de kontraŭ-leĝaj negocoj ĉe impost-paradizoj, oni ne devas kompreni ke ĉiu riĉeco tie gardita estas kontraŭ-leĝa, ofte tiuj kiuj sendas tien sian monon temas pri homoj kiuj enriĉiĝis tute honeste, ni pensu, ke sur la panamaj paperoj aperis ankaŭ grandaj sportistoj. Do, ni proponu tri kategorioj de homoj kiuj sendis sian monon en tiuj impost-paradizojn:

- 1) Homoj dezirantaj pagi kiel eble malplej impostojn.
- 2) Homoj kies havaĵoj ne estas tute sekuraj en sia lando, ni pripensu tiujn homojn kiuj ŝuldas grandan kvanton da mono en siaj landoj, male ili loĝas en luksegaj vilaoj kaj somerumas en grandaj privataj ŝipoj, tamen tiuj domoj, ŝipoj, aŭtomobiloj, ktp, apartenas, almenau el teoria vidpunkto, al entrepreno kiu sidejas en impost-paradizo.
- 3) Fine, temas pri homoj kiuj deziras lavadi sian monon, riĉeco atingita de kontraŭ-leĝaj agadoj.
- 4)

Kiun damaĝas la ekzisto de impost-paradizoj?

La disvolviĝo de la modernaj ŝtatoj, kaj ĉefe de tiuj kiuj pricelas plibonigi la viv-kondiĉojn de la enloĝantaro, baziĝas sur la ideo, ke ĉiuj devas kontribui al la publikaj elspezoj. Kiel asertis la Konstitucia Tribunalo de Hispanio, la Imposta Administracio de ŝtato devas koni la ekonomiajn datumojn de ĉiuj enloĝantoj, do la fundamentaj rajto pri la privateco estas malpli valora ol tiu pri la neceso kontribui al la publikaj elspezoj. Ĉu estus eble samvalorigi ambaŭ principojn? Verŝajne ne. Ĉe niaj socioj evidente, la rajto pri la privateco troviĝas malsupre al la financaj bezonoj de la publika elspezado, ĉiutage pli kaj pli

granda. Eble pro tio, kvankam unuavide la datum-bazoj de la panama entrepreno Mossack-Fonseca estas diskonigitaj kontraŭleĝe, kio ja signifas ne-leĝan altrudon al la privataj agadoj de entrepreno, ja tiu agado estas multe pli malgrava ol la enlokigo de kapitaloj en teritorioj kun la sola intenco eviti la pago nde impostoj sur la ŝtato kie oni devus realigi tiun civitanecan devon.



Placo Svätopluk en Nitro

Mallonga Jura Informo

§

La Arbitracia Tribunalo de Hago (Nederlando) pravigis la argumentojn de Filipinoj en la teritoria disputo ekzistanta inter ĉi tiu ŝtato kaj Ĉinio ĉe la suda ĉina maro. La juĝo, diskonigita post 3 jaroj da studado, deklaras, ke ĉiuj eroj de la Spratla-insularo, tio estas Itu Aba, Thitu kaj la insulo West York, estas leĝe rokoj kaj sur ties ĉirkaŭaĵo ne ekzistas ekonomia ekskluziva zono aŭ eĉ ne kontinenta plataformo.


La juĝo admonas ankaŭ, ke la ĉinaj agadoj en tiu teritorio, ĉefe pro la konstruo de artefaritaj insuloj, iras kontraŭ la Internacia Konvencio por la preventado de maraj kolizioj kaj damnis la koralan ekosistemon de tiu zono.

Tamen, kontraŭ la peto de Filipinoj, la tribunalo ne konsideris necese inkluzivi deklaron cele al kiu Ĉinio devus estontece respekti la rajtojn de Filipinoj en tiu zono, pro la fakto, ke, laŭ la tribunalo, la origino de la disputoj ne baziĝas sur la pretendo de ĉinio aŭ de Filipinoj damni la leĝajn rajtojn de la alia parto, sed sur la malsimila kompreno de la respektivaj rajtoj.

Ĉinio ĵus deklaris, ke la juĝo estas “tute nula kaj nedeviga”, do la oficiala novaĵ-agenco Xinhua deklaris, ke Pekino nek akceptas, nek agonskas la validecon de la juĝo. Poste la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj en Pekino defendis la historiajn rajtojn de ĉinio ĉe la suda ĉinia maro, laŭ ĉi tiu deklaro la teritoriaj disputoj ne povas esti submetitaj al la UN-Konvencio pri Jura Maro.

Rilate alliajn najbaraj ŝtatojn kaj teritoriojn, Japanio defendis la juĝon de la Tribunalo, laŭ la japanaj aŭtoritatoj “Japanio ĉiam defendis la gravecon de la respekto al la leĝoj kaj la neceson solvi la disputojn pac-maniere”. Male, Tajvano ne akceptis la juĝon, ĉar oni konsideras kiel rokon la insulon Taiping, la plej granda insulo de la Spratla-insularo kiu estas sub la tajvana regado. Pri la graveco de la kvalifiko de roko aŭ insulo, dependas la ekzisto aŭ ne de ĉirkaŭantaj 200 mejloj de speciala ekonomia zono.

Spratla-insularo



Konsilia Reglamento n-ro 1, fiksanta la lingvojn uzendajn de la Eŭropa Ekonomia Komunumo (kiel amendite)

LA KONSILIO DE LA EŬROPA EKONOMIA KOMUNUMO,

Konsiderante Artikolon 217 de la Traktato, laŭ kiu la aranĝojn pri lingvoj en la institucioj de la Komunumo fiksas, sen difekto al la dispozicioj en la proceduro regularo de la Kortumo, la Konsilio aganta unuanime;

Tial ke ĉiu el la kvar lingvoj en kiuj la Traktato estas verkita estas rekonata kiel oficiala lingvo en unu aŭ pluraj el la membroŝtatoj de la Komunumo,

ALPRENIS JENAN REGLAMENTON:

Artikolo 1

La oficialaj lingvoj kaj laboraj lingvoj de la Komunumaj institucioj estas la angla, la bulgara, la dana, la ĉeĥa, la estona, la finna, la franca, la germana, la greka, la hispana, la hungara, la irlanda, la itala, la kroata, la latva, la litova, la malta, la nederlanda, la portugala, la rumana, la slovaka, la slovena kaj la sveda.

Artikolo 2

Dokumentoj kiujn membroŝtato aŭ persono sub la jurisdikcio de membroŝtato sendas al la institucioj de la Komunumo povas esti redaktitaj en kiu ajn el la oficialaj lingvoj laŭ la elekto de la sendanto. La respondo estas redaktita en la sama lingvo.

Artikolo 3

Dokumentoj kiujn institucio de la Komunumo sendas al membroŝtato aŭ al persono sub la jurisdikcio de membroŝtato estas redaktitaj en la lingvo de tiu ŝtato.

Artikolo 4

Reglamentoj kaj aliaj dokumentoj ĝenerale aplikendaj estas redaktataj en la oficialaj lingvoj.

Artikolo 5

La Oficiala Gazeto de la Eŭropa Unio estas publikigata en la oficialaj lingvoj.

Artikolo 6

La institucioj de la Komunumo povas fiksi en siaj proceduraj regularoj detalojn pri la aplikado de la nuna lingvo-aranĝo.

Artikolo 7

La lingvo-aranĝoj por la funkciado de la Kortumo estas difinendaj en ties procedura regularo.

Artikolo 8

Se membroŝtato havas pli ol unu oficialan lingvon, la lingvouzo estas fiksita, laŭ peto de la koncerna ŝtato, konfome al la ĝeneralaj regularoj kiuj rezultas el la leĝaro de tiu Ŝtato.

Ĉi tiu reglamento estas deviga kiel tuto kaj rekte aplikenda en ĉiuj membroŝtatoj.

Utilaj Notoj dum la Kuveno de EJA

Nitro 2016



Eldonita en la urbo CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio) julio 2016.

Prezentita en NITRO (Slovakio), okaze de la 101-a Universala
Kongreso de Esperanto, 23-a / 30-a julio 2016.